

Tagiĝo 10

*Neregula cirkulero de
Esperanto-Junularo
en ĈRS.*

*Eldonas Osvětová beseda,
záj. kr. Esperanto, Opava*



Al regionaj delegitoj!

La tempo sufiĉe progresis, proksimiĝas jam la fino de laborjaro kaj ni devas streĉigi niajn fortojn, por ke ni poste povu diri, ke la jaro 1952-53 signifis por ni sukceson pli aŭ malpli grandan..

Mi povas konstati, ke ni iom kreskis rilate nombron, eĉ laboro de multaj grupoj estas kontentiga, sed laŭdi kunlaboron de nia junularo mm ne kuraĝas, ĉar mi ne estas konvinkita, ke ni vere sufiĉe kunlaboras.

La plej grava estas la interrilato de la grupoj mem. Junularo povas uzi por tiu celo korespondadon, kiel proponis s-ano Jirka Pastor, sed ankaŭ necesas personaj rilatoj. En pasinteco okazis tutslovaka junulara konferenco en Svit, regionaj konferencoj en Pardubice, České Budějovice (krom niaj konferencoj tutŝtataj) kaj ni spertis, ke tiaj entreprenoj estas okazindaj. Kial do ili ne okazu ankaŭ nun kaj estonte? Kompreneble ilia aranĝo dependas de la decido de reg. del. kaj la grupoj. Mia opinio estas, ke regionaj kunvenoj estas eksterordinare gravaj precipe nun, kiam al nia movado mankas la centro, kiam ne aperas gazetoj kaj eĉ plejparto de niaj cirkuleroj.

Ŝajnas, ke tian opinion havas ankaŭ esperantistoj en regionoj Ostrava kaj Olomouc, nome en Přerov. Organizantoj eĉ intencis inviti al partopreno regionojn Brno kaj Gottwaldov. Se ili akceptos, kaj mi ne dubas pri tio, en Přerov tiam kunvenos, traktos kaj interkonsiliĝos pri komuna vojo ĉiuj moraviaj esperantistoj. Tio estus vere laŭdinda kaj certe ĝi utilis.

Grandan parton de partoprenantoj kreas dum tiuj konferencoj junularo. Tio estas ĝojiga fakto kaj signifo, ke junularo vere kunlaboras kun la pli aĝaj geasamideanoj. Sed kion ni entreprenu plu? Mi opinias, ke ni povas dum tiaj konferencoj ankaŭ kunvoki kunvenon de junularo kaj tie pritrakti diversajn aferojn rilate la movadon inter junularo. Tio estus grava plifirmiĝo.

En Orientbohemia estas multaj grupoj junularaj, al kiuj utilis interkonatiĝo kaj pliesperantiĝo. Se tia iniciato tie ne aperas de plenaĝuloj, ĉu ne eblus tia kunveno speciale junulara, kiel pasintjare?

Kompreneble ni devas atenti, ke ne okazu en nia lando du entreprenoj de tiu speco samtempe aŭ ĝuste sinsekve!

Ankaŭ ĉi-jare okazos tutŝtata konferenco de EJ. Nun mi petas de vi du respondojn, nome: se okazos Someraj Esperanto-Kursoj en Rožnov p/R., ĉu ni aranĝu la konferencon tie aŭ en kiu alia loko? - Ĉu dum konferenco ni parolu pri ĉeĥe, slovake, aŭ verde, aŭ libervole?

Devo de ĉiuj lokaj delegitoj estas raporti ĝis la 7-a ĉiumonate al reg. del. Ĉu delegitoj de via regiono faras tion? Se ne, vi devas scii kialon de la silentado, por ke vi povu agi. Eble la silentanta grupo malprosperas, do vi devas peni revivigi la grupon. Necesas, ke vi estu en kontakto kun la grupoj. Pri ĉiu ago vi devas scii - kaj viajn spertojn ne kaŝu, sed publikigu kun raportoj en "Tagiĝo"! Ĉu vi skribas al s-ano Novobilský ĉiam ĝis la 15-a?

Mi scias, ke vi havas mulmulde da tempo, ni ja estas ĉiuj en tia situacio kaj mi diras, ke tamen eblas labori. Cetere, helpanton vi certo trovos, se vi mem ne kapablas ion prizorgi, al iu respondi, konsili. Manko da tempo influas, sed ne decidus!

Regiono	I.	Praha	3	/Nombro de grupoj EJ/
	II.	České Budějovice	2	
	III.	Pardubice	10	
	IV.	Brno	6	
	V.	Opava	6	
	VI.	Poprad	2	

Ŝajnas, ke la grupoj estus dividitaj iom neregule. Jes, supra tabelo pravas tion. Sed ni ne povas krei regionojn nur laŭ nombro de grupoj. Ni devas konscii, ke ankoraŭ hodiaŭ eblas fondi novajn grupojn aŭ revivigi la malnovajn. Tiel la nombro povas ŝanĝiĝi. Antaŭ du jaroj en Orientbohemia estis situacio tute alia, preskaŭ malespera, kaj nun la regiono havas plej multe da aliĝintaj grupoj. Neniu de vi postulas fondi novajn grupojn. En loko de kelkaj spertaj ges-anoj povas fondiĝi grupo kun viaj minimuma helpo kaj peno. Ni ankaŭ devas okupi nin per seriozaj kaj gravaj laboroj, sed ni ne dronu en problemoj, Junularo ĉiam gajas, esperas kaj ne okupas sin tiom por nesolveblaj oferoj.

S-ano Míla Vlk sciigis, ke li eble soldatservis en aprilo. Se tio vere okazos, mi intencas dume transdoni zorgojn pri la regiono II. al s-ano Jiří Pastor /por tri monatoj/. Ĉu vi konsentas kun la eventuala ŝarĝo? /Precipe J.P./

Nun ni havas jam 29 grupojn, poste informliston promesis resendi ankaŭ Junularo Litomyšl. Ankaŭ mi atendas informliston el Svit-Tatry.

S-ano Milan Neubeler, ĉu Junularo Sp. Nová Ves malaperis?

Ges-anoj, ĉu Junularo Plzeň ne volas kunlabori?

Kial ripozis Junularo Gottwaldov? Ĉu ĝi ne povas daŭrigi sen samideanoj Němec kaj Vitovský?

Ĉu Junularo Háj u Opavy ankoraŭ ekzistas?

Ĉu junularo en Strakonice ne aliĝos?

České Budějovice, pli bone dirite, M. Vlk, jam antaŭ tempo aŭdiĝis. Ni ĝojas pri tio. Ĉu tie Junularo denove viglas?

Nova Junularo aliĝis en regiono Brno, nome en Sudoměřice ĉe Hodonín. Adreso de la delegito estos en Tagiĝo.

Ĉu vi scias, ke kelkaj esperantaĵoj estas aĉeteblaj ĉe Esperanto-rondeto de Osvětová Beseda en Plzeň, pošt. příhr. 232?

Aŭ kaŝe aŭ malkontentige iras laboro en kunmetado de kartoteko de ĉs. esperantistaro - Ostrava - novembro 1952. Eble mi mem devos tion prizorgi. Mi poste petos vin pri helpo.

Atendante viajn sciigojn salutas vin sincere

Jan Werner

Adreso ĝis la fino do majo:

Jan Werner, /u p. Krupici/

Gottwaldova 86

Brno



Legante "Heroldon de Esperanto" ni rimarkis la artikolon pri debato en nederlanda Parlamento pri Esperanto-instruado.

Tiu ĉi propono estis subtenata de nederlanda ministro de instruado kaj estis pritraktita dum kunsido de Parlamento.


Post la debato Parlamentanoj voĉdonis per 44 kontraŭ 37 voĉoj kaj tiel la propono estis rifuzita.

Por la propono voĉdonis socialistoj, liberaluloj kaj komunistoj, kontraŭ katolikoj.

Kvankan do, la propono ne estis akceptita tamen la fakto, ke preskaŭ duono de Parlamentanoj voĉdonis por Esperante estas grava sukceso de nia movado.

ŜTAFETO

Post la silentiĝo de grava literatura gazeto "Literatura mondo" mankis al nia movado ebleco eldonadi la tradukojn kaj originalajn verkojn de Esperanto-poetoj. Feliĉe aperis jam la nova eldonisto kaj lia STAFETO transprenas la taskon de fama "Literatura Mondo" kaj daŭrigas la agadon de Kolomano Kalocsay kaj lia rondo. Unua eldonita libro estas Kvaropo, enhavanta la poemojn de 4 eminentaj poetoj: Auld, Dinwoodie, Francis, Rossetti.



Jugoslavio: En Zagreb okazos la 38a Universala Kongreso de Esperanto. Okazo de tio decidis la Jugoslavia Filatelista Asocio eldoni la memorigan poŝtmarkon.

Post dua mondmilito eldonis Esperantan poŝtmarkon ankaŭ Bulgario kaj Aŭstrio.

~ * ~

Pollando: En Polujo ekzistas leĝe registrita Asocio de Esperantistoj. Ĝia sidejo estas en Varsovio. La Asocio eldonas ciklostilitan bultenon "Tra la mondo kaj Literaturo", kie estas represata la ĉefverko de pola nacia literaturo Sinjoro Tadeo, en brila traduko de fama pola Esperante- pioniro A. Grabowski.

Ankaŭ la rondeto en Vroclaw komencis la eldonadon de bulteno "Glos Esperantistow" por informado de membroj.

K o r e o: En la Universitato Chunggu en Taegu, Esperanto estas enkondukata kiel deviga fakto. 200 lernantojn partoprenas nun la kurson.

G e r m a n u j o: Estis organizita instruado de Esperanto, deviga kun 5 lecionoj ĉiusemajne por 5a klaso de unugrada lernejo Sankta Maria en Bon.

Al regionaj delegitoj!

Denove mi audiĝas, sed hodiaŭ nur koncize! Mi devas sciigi al vi jenon:

La 23an kaj 24an de majo okazos en Přerov laborkonferenco de regionoj Ostrava kaj Olomouc. Aliĝilojn akceptas s-ano Jurka, Přerov, Horní náměstí 20.

Se vi deziras lokon en tranoktejo, vi nepre devas aliĝi ĝis la 17a de majo kaj sendi antaŭpagon 40,- Kčs. Vi povas ankaŭ peti tagmanĝon.

Mi kunvokas tien kunvenon de la regionaj delegitoj. Kiu povas venu! Ni pridiskutos kaj decidus la aferon de ĉi-jara tutŝtata laborkonferenco de Junularoj. Se vi mem ne povas veni, sendu vian anstataŭnton! Se neni de vi partoprenos respondu al mi baldaŭ la demandojn:

Kiu estu la loko de nia konference. (Bonvolu mencii ankaŭ kaŭzojn de via decido!)

Kiam ĝi okazu?

Kiun lingvon vi konsideras taŭga por nia konference?

Ĉu vi havas proprajn atentigojn? Sciigu ilin!

Nun mi prezentas parton de la letero sendita de s-no M.D.Goninaz, zorganto pri dokumentado kaj gazetservo de TEJO:

Vi sendube eksciis, ke ĉi-jara kongreso de TEJO okazos en Wörgl - Aŭstrujo. Aŭstrujo estas apuda lando de Ĉeĥoslovakio, kaj estus dezirinde, ke reprezentantoj de ĉs. junularo partoprenu tiun kongreson. Mi scias ja, ke tio estas malfacila afero, sed ĉu vi kredas, ke se la Organiza Komitato intervenos ĉe la ĉeĥoslovaka ambasadorejo aŭ legacio en Aŭstrujo, oni eble atingus la rezultaton?

Por la Universala Kongreso en Parizo en jaro 1950 mi scias, ke la Organiza Komitato sukcesis per paŝoj ĉe la ambasadorejoj havigi la permeson por limiga nombro de delegitoj el ĈSR, Pollando, Bulgario ktp. Kion vi opinias pri la afero?

Internacia kongreso estas ĉufa, gravega afero en la esperantista vivo. Tial estus tre bone, se unu aŭ kelkaj delegitoj de ĉs. junularo sukcesus partopreni la kongreson en Wörgl.

Michel Duc Goninaz, 12, Place de la Republique,
Paris 10 - Francio.

Kongreso de TEJO okazos en Wörgl de la 3a ĝis la 10a de aŭgusto 1953.

Adreso: TEJO – Kongreso 1953, Wörgl, Aŭstrio.

S-no Vlasta Novobilský sciigis min, ku ĉi-foje venis eksterordinare multaj lokaj raportoj por la TAGIĜO. Mi ĝojas pro tio kaj dankas al vi por via laboro!

Fine mi vokas: Ĝis la revido en Přerov!

Samideane salutas vin

Jan Werner

oooooooooooooooooooooooooooo

En Danujo donove estas aranĝita Arkeologia Internacia Tendaro, subvenciota de dana ŝtato. Partopreni povas studentoj-esperantistoj, flue parolontaj Esperantan lingvon.

La tendaranoj elfosos Vikingan fortikaĵon apud la urbo Hobro en Nordjutlando.

En libera tempo partoprenantoj vizitos la ĉirkaŭaĵon kaj ĝiajn vidindaĵojn. Vespere okazos diversaj prelegoj kaj artaj programoj.

oooooooooooooooooooooooooooo

Venu al Přerov

kie okazos la regiona kunveno de regionoj Ostrava kaj Olomouc.

Sabate la 23an de majo estos la interkonatiĝa vespereto je la 19a horo. La laborkonferenco estos dimanĉe la 24-an de majo.

Vespereto sabate, konferenco kaj komuna tagmanĝo dimanĉe estos en restoracio en urba parko "MICHÁLKOV".

La programo estas jena:

Vespereto komencos je la 19a horo per kultura programo kiu daŭros proksimume 2 horojn kaj 30 minutojn. Post ĝi dancado.

/ Post fino de vespereto promenado en bela parko dum bala luna nokto. Lunon kaj belan veteron ni jam mendis! /

Konferenco komencos je la 9-a horo per raportoj el unuopaj Esperanto-grupoj. Post la konferenco estos la komuna tagmanĝo. Post tagmanĝo ekskurso al rivero Bečva, aŭ vizito de bela urba muzeo, kie troviĝas unika kaj plej granda kolekto rilate al vivo kaj verkoj de granda Jan Amos Komenský. Multaj liaj manskribaĵoj kaj aliaj vidindaĵoj troviĝas en tiu ĉi kolekto.

Kolekton kolektis nia, bedaŭrinde jam mortinta fervora Esperantisto faka instruisto, lernejestro Josef Krumpholtz, plej parte helpe de nia kara lingvo. Se sufiĉos al ni la tempo ni efektivigos ankoraŭ la viziton en unika "Ornitologická stanice" apud la parko.

Tranoktejo estas certigita, sed ĉiuj interesuloj devas sendi antaŭe jam 40,- /kvardek/ kronojn por unu persono. Kiu volus komune tagmanĝi ankaŭ devas sendi aliĝilon, ĉar en restoracio oni preparas nur tiom da tagmanĝoj, kiom ni kelkajn tagojn antaŭmendos.

Aliĝilojn ni devas havi ses tagojn antaŭ la konferenco por ke ni povu certigi al ĉiu tranoktejon. Same aliĝilojn por tagmanĝoj.

Ĉiuj Esperanto-grupoj estas ankaŭ petataj, por ke ili aliĝu la kulturajn enmetaĵojn, kiujn ili prezentos.

La aligilojn kaj informojn petu de samideano

RICHARD J u r k a

Horní náměstí 20,

P Ě R O V

VENU AL PŘEROV KIE EN AMIKA RONDO VI ĈERPOS NOVAJN FORTOJN POR VIA PLUA LABORO!!

ATENTU JUNULARAJ GRUPOJ III

Dum konatiĝa vespero en Přerov estos ebleco montri al niaj pliaĝaj s-anoj ion el nia kultura laboro. Krom tio ni proponas ankaŭ konkurson inter unuopaj Junularoj! Nomon de la plej bona ni represos en TĀGIĜO!

EK AL LA LABORO!

LOKAJ INFORMOJ

Olomouc: Ĉar antaŭ nelonge komencis kurso por progresantoj, vizitadas plej parte anoj de nia "Junularo" ĉi tiun kurson kaj ne havas jam tempon kunvenadi ankoraŭ horon pli longe. Kunvenoj de Junularo ĉesis kaj kiu povas, tiu vizitadas normalajn kunvenojn de la klubo. Ni esperas, ke post finiĝo de E-kursoj por komencantoj kaj progresantoj ni denove komencos agi.
Nad'a Pokorná

Svitavy: Nia rondo havas ok anojn, sed mankas junularo. Kurson por komencantoj gvidata de s-ano Rýznar vizitadas proksirume 15 gestudentoj el gimnazio. Kurson por progresantoj ni ne povis efektiviĝi ĉar mankis ejo. - Pavel Tichý



Přerov: La 31-an de marto ni aranĝis la publikan lumbildan prelegon. Ĝi estis jam dua en tiu ĉi jaro. Ni planas regule ripeti ilin kun novaj temoj kaj bildoj. En aprilo ni preparas tutregionan ekskurson al Bystřice p. Hostýnem, ankaŭ ni volas viziti nian karan s-anon J. Teodor Čejka kaj faman ĝardeniston s-anon Chvatík. Poste ni volas ekskursi al fama pilgrima loko Hostýn. Ankaŭ ni preparas esperantan kunvenon el ĉiuj regionoj de Moravio.

Brno: La Junularo en -Brno preparis la 3an de marto 53 por la klubo Poezian vesperon. Ĝian programon prezentis tradukoj de ĉeĥaj poemoj de J.Š.Baar, M. Jirko, J.Neruda, J.Seifert, K.Toman kaj S.K.Neumann. La tradukojn, kiuj estis la unuan fojon deklamitaj dum ĉi vespero, verkis afable s-anoj R-Hromada, J. Kořínek kaj Dr. T.Pumpr, al kiuj ni tre dankas por ilia oferema helpo. Recitis plejparto de anoj de nia Junularo.

Most: Dum somero nia grupo kunvenadas nur unufoje semajne, laŭeble ĉiam en la naturo kun devizo: "Parolu nur verde". Ni kunvenadas ĉiam je la 18a horo sur la placo de TGM antaŭ la propaganda kesteto. La 26an de marto estis finita E-kurso por komencantoj, kiun gvidis s-anino Závorková. La propaganda kesteto sur la placo de TGM estas regule ŝanĝata kaj akiris jam grandan intereson. Kunveno la 17-an de marto estis dediĉita al mortoj de J. Stalin kaj K. Gottwald. Dum somero intencas nia rondeto entrepreni multajn dimanĉajn ekskursojn. La 5-an de aprilo efektiviĝis jam la unua al ĉirkaŭaĵo de Červený Hrádek.

Praha: Junularo kunvenadas ĉiujfaŭde je la sepa horo en klubejo (Praha XII, Římská 35). Dum la kunveno estas kurso por ĉiu, kiu estas aranĝita tiamaniere, ke la anoj estas dividitaj en grupetoj po 2 aŭ 3 laŭ ilia lingvoscio kaj gvidantoj de tiuj grupetoj estas anoj, kiuj bone regas la lingvon. Poste sekvas kantado aŭ preparo de programo por E.K. Praha. Dum marto estis ankaŭ daŭrigataj kursoj por blinduloj en "Klárův ústav slepců".

OPAVA RAPORTAS

La kurson por komencantoj ni finigis per ekzamenoj kaj ĝiaj partoprenantoj kunfandiĝis kun s-anoj el nia Junularo.

Dum niaj kunvenoj ni konatiĝas kun Esperanto - historio, literaturo kaj referatforme ni informas niajn membrojn pri E - movado helpe de materialo kiun ni ĉerpas el Heroldo de Esperanto.

Ĉar preskaŭ tuta nia Junularo volas viziti la konferencon en Přerov, ni preparas nelongan kulturan enmetaĵon, kiun prezenti ni volas sabate vespere.

Ni esperas, ke ĝi sukcesos!!!

Sed la ĉefan zorgon ni turnas al preparo de Somera lernejo en naturo, al garantio de tendara loko kaj bezonaj tendoj. Nia klopodo estas prepari por niaj junaj Esperantistoj belan kaj varman Esperantan medion ligitan kun agrabla rekreacio en ĉarma naturo.

Ni salutas la novan Esperanto-grupon en
SUDOMĚŘICE

kies delegito fariĝis s-ano Jan Kohéda, SUDOMĚŘICE, p. Strážnice.

Junularo:

O s t r a v a : Ni ŝanĝis kunventagon. Nun ni kunvenadas regule ĉiuĵaŭde je la 18,30 horo en klubejo de Lidový dům en Slezská Ostrava. Programo estas: kurso gramatika-historia, novaĵoj de la semajno, ludoj, kantado. Ni aranĝas komunajn dimanĉajn ekskursojn.

V. S.

N o v é M ě s t o n / M : Pasintan jaron dum la vinto mi fondis tie rondeton ĉe nia faka lernejo. Gekursanoj estis niaj lernantoj kaj s-ano Kodytek el Krčín. El ĉiuj mi restis en Nové Město nur mi sola, ĉar niaj lernantoj foriris al siaj laborejoj kaj disiris en diversajn lokojn de nia lando. Ilia nuna laborejoj estas Chronor en Praha, Liberec, Brno, kaj alie. Dum tiu ĉi lernejjaro mi instruas ĉiutage antaŭtagmeze en Nové Město kaj posttagmeze en Náchod. Ĉar mi laĝas en Dolní Radechová (vilaĝo proksima al Náchod) mi ne komencis novan kurson en Nové Město n/M sed mi laboras kun samideanoj en Náchod, ke ni regule kunvenas.

Bureš Josef

B r n o : La tutan monaton marton ni dediĉis al preparo de programo por kluba kunveno, kiu okazis la 7an de aprilo 1953. Por tiu ĉi vespero estis programitaj fragmentoj el teatraĵo de Viktor Dyk: Andreo kaj Drako en traduko de nia klubprezidanto samideano Josef Vondroušek. Parkerigo de roloj, dufoja ekzercado dum semajno kaj preparo de kulisoj propraforte postulis pli da oferemo kaj pli da tempo de ĉiuj anoj. Feliĉe la vespero sukcesis kontentige kaj por nia Junularo, kaj por la gesamideanoj, kiuj partoprenis ĝin.

T ř e b í ĉ : En februaro krom normalaj kunvenoj kaj interparoladoj ni aranĝis ekspozicion "Esperanto en la pacbatalo" por kiu la materialon pruntis al ni Junularo el Praha. Ni aliĝis al la konstrua agado kaj kolektis pli ol 500 kg da papero. En marto ni aranĝis kelkajn ekskursojn kaj faris monatajn ekzamenojn el la trastuditaj lecionoj.

V s e t í n : Preskaŭ ĉiuj anoj de Junularo korespondas kun eksterlando. En lasta tempo ni sukcesis ligi kontakton kun gesamideanoj en Nova Zelando.

Ĉiujare niaj bravaj propagandistoj per sindona laboro kondukas novajn adeptojn al nia movado. Sed tiuj novaj adoptoj ofte forlasas nian movadon antaŭ finlerno de nia lingvo.

Kial? Certe ne estas nur unu kaŭzo. Sed mi ofte demandis al mi mem, ĉu niaj trr bonvolaj kaj oferemaj instruistoj kaj intruantoj ne tre serioze instruas la gramatikon al la novuloj kaj tute preterlasas eduki ilin.

Laŭ iu vortaro eduki signifas: zorgi pri la evolucio de fizikaj kaj moralaj kaj intelektaj kapabloj de infano aŭ besto.

La pesimiston mi jam aŭdas diri: Se la nova adepto ne jam el si mem estas fizike, morale kaj intelekte forta, la intruisto certe ne sukcesos plibonigi lin tiurilate.

Mi tuj diras: Ne, tion ni certe ne atingos. Sed ni almenaŭ zorgu, ke li ekkonu la Zamenhofan idealon, ke li legu la paroladojn de nia majstro Zamenhof kaj ties biografion de Privat. Ke ĉiu vera Esperantisto devas legi kaj relegi la poemon "La vojo", estas nemkonpreneble, kaj la instruisto jam de la komenco instruu ŝin aŭ lin aboni iun gazeton Esperantistan.

Kompreneble la komencanto komence bezonas la helpon de iomete sperta Esperantisto, sed post "fali kaj ekstari" li iom post iom kaptos nian spiriton de nia lingvo kaj ĝi firmtenos lin. Nur tiel povas nia movado normale kreski.

Por ni ne estu la alternativo "instrui aŭ eduki" sed INSTRUI KAJ EDUKI je la profito kaj gloro de nia Zamenhofa idealo.

HAREMANO

ESPERANTO en lernejoj:

NEDERLANDO: En du klasoj de teknika mezlernejo "Technikum" en Rotterdam, Esperanto estas devige instruata.

ITALIO: Profesor o Segni, ministro pri edukado en speciala cirkulero al ĉiuj distriktaj rektoroj rekomendas la instruon de Esperanto kaj permesas uzi la klasĉambrojn kiel la kunvenejoj de E-grupoj.



Vážení čtenáři!

V tomto čísle přinášíme vám bližší podrobnosti o naší letní škole esperanta v přírodě.

Jak jsme již v minulém čísle oznámili, je náš tábor rozdělen na dvě části, a to po 14 dnech:

1. turnus započne 19. července a potrvá do 1. srpna, kdy současně započne druhý turnus, trvající do 15 srpna.

Pro všechny účastníky je zajištěna 50% sleva na dráze.

/Pro informaci sdělujeme, že poslední vlaková stanice je Opava, vých. nádraží. Pro ty, kteří by nás chtěli navštívit je poslední stanice Hradec u Opavy./

Vzhledem k tomu, že naše zásobovací podmínky jsou o něco těžší než loni, stanovili jsme částku za 14 dní pobytu na 900.-, /slovy: devět set Kčs./

O esperantský život se budou starat tentokrát instruktoři z mimoopavského Junulara, protože opavští jsou v tutu dobu postiženi maturitami, podle nového ustanovení.

Kromě zelené krmě / nemyslíme tím ovšem ani seno ani trávu, ale esperantskou gramatiku a historii/ dostanou účastníci denně 5x výživnou stravu.

Abycho mohli všechno důkladně zařídit a připravit je nutno, abychom věděli brzy přesný počet zájemců, proto přihlášky pošlete nejpozději do 15. června 1953, na dole uvedenou adresu.

Tábor je pořádán pro chlapce a děvčata, již esperantisty. Je pořádán pro ty, kteří mají zájem se esperantu důkladně naučit a hlavně pro esperanto dále pracovat. Dát účelné rady těm, kteří nemají ještě potřebné zkušenosti ve vedení Junular, v přípravě kulturních programů, to je úkol druhého turnusu tábora; vychovat funkcionáře našich skupin!

Do prvního termínu zveme ty, kteří chtějí ucelit své znalosti esperanta a přijít do družného esp. prostředí.

Všichni si ovšem musí uvědomit, že vstupem do tábora se podrobují táborovému řádu, který je zde proto, aby nedošlo k nesrovnalostem, a aby vše se dařilo ke spokojenosti jak účastníků tak i vedoucích.

Naše diskuse o aktuálních problémech našeho jazyka chceme doplnit serií přednášek, svou účast přislíbil i s-ano prof. Kožený z Kutné Hory. Do denního pořadu je započítáno jednak vyučování a jednak diskuse.

Vlastního vyučování budou 3 /tři/ hodiny denně!

Promysleta si tuto možnost prožít pěkných 14 dní v přírodě a mezi samideány a pošlete nám přihlášku na adresu:

Blažena Kuzníková,
Rooseveltova 17, O p a v a

ĜIS LA REVIDO EN OPAVA!!

Sciigo por Esperanto-delegitoj:

Bonvolu noti, ke delegito de Junularo de České Budějovice
fariĝis samideano

Miroslav Vlček,

Malinovského 51, České Budějovice.

oooooooooooooooooooo

Redakcio de TAGIĜO kore dankas al samideano Lešingrr el Praha, kiu sendis al nia
cirkulero ciklostilpaperojn.

Koran dankon!!

oooooooooooooooooooo

KORESPONDI DEZIRAS:

S-ro Masuichi Matsui / 20 jara / , GAMO-cho IV-90, Ĵoto-ku, OSAKA,
Japanujo. Pri belartoj, aŭtomobiloj kaj inter-
ŝanĝi gazetojn pri aŭtomobiloj.

S-ro Saburo Sawabe, / 20 jara / , ĉe Esperanto-rondeto de Osaka Te-
knika Kolegio, Omiya-cho, Asahi-chu, OSAKA, Jap.
pri ĉiuj temoj, precipe kun fraŭlinoj.

F-ino Akito Ito / 19 jara / , Ota-cho, VII-2, Suma-ku, KOBE, Jap.

Al sinjoro - sinjorino